

# La postmilita sidejo de Germana Esperanto-Asocio en Pasing

## Centjara jubileo – memorigo pri d-ro Siegfried Ziegler

En la bulteno de la asocio „Pasinger Archiv“ aperis longa artikolo pri la Esperanto-vivo tie antaŭ 100 jaroj. La 8an de novembro 1911 post (tre malbone vizitata!) fondokunveno ekiĝis Esperanto-grupo en la tiam memstara urbo. Decembre de 1945 iu d-ro Siegfried Ziegler ricevis permeson de la Usona militista registaro, fondi la Munkenan Esperanto-grupon „Laboro“. Kiu estis d-ro Ziegler?

**D**-ro Siegfried Ziegler naskiĝis en 1902 en Essen, studis geografion kaj botanikon kaj doktoriĝis pri filozofio. Li laboris kiel sport-instruisto, post la milito kiel ĵurnalisto kaj verkisto. Li eklernis Esperanton jam en 1924 kaj aniĝis al la laborista Esperanto-movado. Aprile de 1947 li kun-iniciatis la refondon de Germana Esperanto-Asocio (GEA) kaj estis ĝia prezidanto ĝis 1953.

Ziegler luprenis la ter-etaĝon en la „vilao Heilmannseeder“ (malkonstruita fine de la 60aj jaroj), en Pasing, Engelbertstraße, kiu iĝis la sidejo de GEA. Tie renkontiĝis la loka grupo „Nova tempo“, okazis kursoj kaj ekveturis busoj al eksterlandaj Esperanto-aranĝoj. Pli grave: Ziegler fondis en 1948 ankaŭ la Germanan Esperanto-Instituton (GEI), kies biblioteko trovis sian lokon en la vilao Heilmannseeder. Li estis multfaceta



Vilao Heilmannseeder en Pasing (1968)



D-ro Siegfried Ziegler (1902-1984)

talentulo, akiris instrukomisionojn en la Munkena universitato kaj en la Teknika Altlernejo, invitis sukcese la 36an Universalan Kongreson en 1951 al Munkeno, verkis kaj distribuis lernolibron sub la pseŭdonimo „brikisto“, eldonis la GEA-revuon „La Ponto“, ktp.

En 1953 li subite kabeis, kio estis terura bato por GEA. Kio okazis? Kiel ano de la laborista Esperanto-movado li ne povis elteni la re-aliiĝon de GEA al la burĝa Universala Esperanto-Asocio. Sed ankaŭ GEA-internaj kritikoj kontraŭ lia eble kelkfoje tro neformala agado senrevigis lin. Kun li malaperis ankaŭ la GEA-sidejo en Pasing. Pri la sorto de la biblioteko oni povas legi en la broŝuro „100 Jahre Deutsches Esperanto-Institut“ (eldonis GEI, Augsburg 2008, p. 30ff). Se Ziegler kaj liaj kritikantoj kapablus al pli da suverena respondeco favore al la komuna celo, la postmilita historio de GEA eble havus pli gloran evoluon.

**Rudolf Fischer**

*La teksto estas kompilaĵo el bulteno de „Pasinger Archiv“, laŭ notoj de Norbert Gütter, el la citita broŝuro de GEI kaj el artikolo de d-ro Werner Bormann el „Interlinguistische Informationen“ 1998 (Beiheft 4, p. 30-33). Pro la bildoj mi dankas al „Pasinger Archiv e.V.“.*